# EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

ilei

Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

**EKO 2023 / 44. Julio 28 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj (lingva kontrolo): Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 300 KB. Sume: 340 KB**

**temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipe koneblaj.**


## La granda homa ĉeno ĉe ni

La granda ĉeno ligas aktivajn esperantistojn – ne nepre estraranojn kaj oficantojn, sed ĉiutagajn aktivajn esperantistojn. Temas pri iniciato de ILEI. La nuna ĉeno enhavas interalie Evildean en la Muzeo de Esperanto de Zaozhuang, la nepinon de Verda Majo, kiu mem parolas Esperanton. Indas rigardi la filmeton!

https://youtu.be/noJXDTIG3jk

Alessandra Madella.

## ILEI eldonis sian trimonatan raporton

En majo okazis la 12-a ILEI-forumo kun la temo "ILEI-Kongresoj ". Temis precipe pri la ĉi-jara kongreso kaj pri la sekvonta. Jen la ligilo por spekti:
https://www.youtube.com/watch?v=smbQ-DQiVzc

La 29-an de junio okazis la forumo "Kulturaj Interŝanĝoj kaj E-disvastigo en la Nova Epoko", organizita de Ĉina Komunikila Grupo, kies parto Ĉina Radio Internacia nun estas, kunlabore kun ILEI. La forumo celis dividi opiniojn pri la rolo de Esperanto kaj eduko por kulturaj interŝanĝoj en la nova epoko por antaŭenigi realigon de la komuna celo de esperantistoj, ĉinoj kaj de ĉiuj homoj. Prezidanto Ahmad Mamduhi kaj vicprezidanto Alessandra Madella estis invititaj paroli nome de la Ligo. (EKO raportis pri tio). Ahmad prezentis inde la instruistan ligon. Li parolis pri graveco de edukado kiel bazo por evoluo en vivo de iu ajn homo, lando kaj la mondo ĝenerale, pri edukada justeco kaj pri la potenciala rolo de Esperanto kiel facile lernebla lingvo en monda komunikado. Aparte li substrekis signifon de nia Internacia Lingvo por Ĉinio kiel ponto kun aliaj landoj kaj ilo por formado de nova kulturo. Alessandra prezentis la sukcesan italan projekton "30 Oraj Horoj", rakontis pri la prestiĝa premio pri kvalito de instruado, kiun ĝi ricevis de Erasmus kaj INDIRE, kaj pri sia libro pri lernofaciliga Esperanto, menciante precipe la eksperimenton de Wei Yubin (Jado) kaj Jennifer kaj Alan Bishop kaj la korespon-dadon inter ĉinaj studentoj kaj

italaj kaj francaj lernantoj. La forumo estis dissendita de la Ĉina Radio Internacia, kunlabore kun ILEI (ĉe la jutuba kanalo de ILEI: Esperanto+Edukado ILEI)

https://www.facebook.com/608622747951605/videos/816546079676408 https://www.youtube.com/watch?v=rxFmhh13RMU

Ekis la kreado de la anglalingva parto de la paĝaro de ILEI. Preparas Stefan MacGill, kunlaboras Jozefo Nemeth. Tio celas plian disvastigon de la agado de ILEI. Ekde nun eblos ĝin trovi en unu loko ankaŭ ĉe www.ilei.info.

Serĉu sub 'Agado >English'. Klaku la ligojn tie por vidi la tri du-lingvajn paĝojn, kiuj jam pretas: Enkonduko, Kongresoj kaj Revuoj (IPR kaj Juna Amiko).

La kunsido de la Komitato de ILEI okazos frue en aŭgusto.  Ĝi estos hibrida (reta kaj ĉeesta).  Jen la retejo, kie troveblas la aktuala versio de la plena kongresa programo: La kongreso estos partoprenebla ankaŭ rete.

https://2023.kongreso.org/ILEI_chefa.php

*La Estraro gratulas nian vicprezidanton Alessandra Madella pro la alta taksado, kiun ŝi ricevis kiel Esperanto-instruistino deflanke de la gestudentoj en la Zaozhuang-universitato en Ĉinio (la partnero de ILEI, kie ekzistas Esperanto-Muzeo kaj Esperanto-fako)! Tiu rekono gravas ne nur kiel persona atingo, sed kiel sukceso de la ĝenerala instrua laboro de ILEI kaj disvastigo de Esperanto.*

Marija Jerković, la estrarano pri Lerneja kaj Landa Agadoj, prezentis la rezultojn de sia granda laboro pri kontaktoj kun landaj sekcioj. ILEI havas nun 34 sekciojn, 11 reprezentantojn kaj 8 kontaktpersonojn.

Danke al kunlaboro inter ILEI kaj la Afrika Komisiono, ekestis iniciato proponi retajn/*zoom*-ajn aŭ vacapajn/pertelefonajn kursojn al afrikanoj (en Afriko *zoom* ne estas tre efika pro manko de komputiloj, reta kunligo kaj eĉ de elektro). Pri kurso portugallingva: "Kurso senpaga pri la internacia lingvo Esperanto por portugal-lingvaj afrikanoj komenciĝos la 2-an de aŭgusto 2023 per Vacapo. Instruas Miguel Bento. Aliĝu: <miguel.r.bento@gmail.com>".

La cetero de la trimonata raporto tro longas por EKO. Vidu ĝin ĉe:

https://www.ilei.info/agado/2023-07-15_Raporto_pri_trimonata_periodo.pdf

Elena Nadikova, Prezidanto de ILEI:, Ahmad Reza Mamduhi

## Libroservo de Brazila Esperanto-Ligo

La retadreso < bel-libroservo@esperanto.org.br>  ne plu tiom utile funkcias. Prefere uzu: https://esperanto.org.br/info/.

## IKEF ĉiusemajne – ĉi-foje pri Brazilo

Okazis julie la 124-a Dimanĉa Kunveno de IKEF per Zoom kaj Voov! La temo estis: "Evoluo de Brazila ekonomio dum la 20-a jarcento kaj Respublika periodo" kaj la preleginto s-ro Aldreno Speko, Brazilo/Ĉinio.

## La Eo-domo en Havano remalfermita

Ĉi-jare KEA festis en junio sian 44-an fondo-datrevenon fokuse al la graveco de kubaj bibliotekoj en la disvastigo de Esperanto. En la Nacia Sidejo okazis kultura

vespero omaĝe al la datreveno. La programo inkuzivis prezenton pri biblioteka graveco, pri Esperanta muziko, radio kaj Vinilkosmo, okazis E-kvizo, kantado kaj poem-deklamado.

Pli frue la informa fako de KEA kunordigis radio-intervjuojn en la naciaj stacioj *Radio Taino* kaj *Radio Rebelde*, ĉi lasta kun la kontribuo de Roberto Nuñez de la Havana filio. La kubaj esperantistoj okazigis diversajn renkontiĝojn, informis per radiostacioj kaj ciferecaj gazetoj kaj kunfestis novan jaron de Esperanto en Kubo. Fine de majo, la provinca filio Urbo Havano malfermis siajn pordojn al la havanaj esperantistoj en la jam konata sidejo en Malnova Havano, kiu de kelkaj jaroj estis fermita pro diversaj problemoj rilate al sia konstrua stato.

Junie, en tiu sidejo okazis kultura vespero, kun prezentaĵo pri la rolo de kubaj bibliotekoj en la historio kaj nuntempo de Esperanto. Okazis Eo-kvizo, prezento pri muziko kaj Esperanto, la agado de la franca disko-firmao Vinilkosmo, kaj laste ni ĝuis poem-deklamadon de kubaj amatoraj artistoj plus kantojn. Partoprenis pli ol trideko da havanaj geesperantistoj, ankaŭ malnovaj aktivuloj kaj nia honora membro Fernando Paredes. Oni ankaŭ elvokis la agadon de elstaraj kubaj esperantistoj forpasintaj dum la lastaj jaroj, interalie, Francisco Briel, ankaŭ honora membro de nia Asocio, kaj Héctor Jiménez elstara kultura aganto kaj organizinto de la kongreso de ILEI en Hanabanilja en 1990.

Fine de junio okazis renkontiĝo en la publika biblioteko Máximo Gomez en Havano, loko kie en 1979 rekomenciĝis amasa instruado de Esperanto survoje al la kreado de KEA. En la biblioteko okazis prezento pri la historio de Esperanto, komentoj pri la koncerna libro verkita de Juan Ramón Rodríguez, panoramo de nia plurjardeka agado per fotoj, lingvaj trajtoj de Esperanto kaj la movado. Partoprenis naciaj kaj havanaj estraranoj de KEA, ankaŭ reprezentantoj de la biblioteko kiuj malfermis ekspozicion de esperantaj libroj, kies bulteno raportis pri ĉi tiu renkontiĝo, kiun partoprenis grupo de membroj de la Asocio Nacia de Blinduloj (ANCI).

La Esperanto-grupo de Guantánamo raportis pri jubilea renkontiĝo kun partopreno de aktivuloj de la loka movado, kies laboro senhaltas en la urbo de La Famo.

Danke al iniciato de nia instruisto Miguel Ángel González, stariĝis nova klubo de Esperanto ĉe la baza lernejo en Urbo Havano "Reinel Páez Pérez", kun pli ol 40 gelernantoj de la 4-a grado. Komence la infanoj jam povas rekoni Esperantajn vortojn kaj eĉ legi esperantajn frazojn. Aldone al tio, Miguel Ángel lanĉis konkurson inter la gelernantoj, pri kio estas Esperanto kaj kiu estis ĝia kreinto. Li anoncis la rezulton dum aranĝo en la Nacia Sidejo de KEA.

**Laŭ bulteno, kiun redaktis: Ariadna García Gutiérrez (estrarano pri informado KEA)
kaj Maritza Gutiérrez González (ĝenerala sekretario)**

## Nia medicina faka asocio donas praktikan helpilon

UMEA sur la paĝo http://umea.fontoj.net/projektoj/ disponigas frazaron en diversaj lingvoj. Ĝin uzu kuracistoj en sia komunikado kun fuĝintoj. Laŭ tiu retejo, la servo ekzistas por la albana, dana, flandra, portugala kaj slovaka. Se via lingvo ne ekzistas, anoncu vin al UMEA.

## Oratoru aŭ aŭdu oratoraĵojn en Torino

Kiel parto de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto (VK) okazos Oratora Konkurso por la junularo. Tio celas evoluigi la Esperantan parolarton inter la junularo. Rajtas partopreni gejunuloj en TEJO-aĝo (ĝis-35-jaraj), kiuj aliĝis al la UK.

Partopreno estas senpaga, sed la kandidatoj devos anonci sin minimume unu tagon antaŭ la konkurso al la Komisiono de UEA pri la Oratora Konkurso pere de Marc Giraud - marc.giraud@orange.fr (KN 95). La Oratora Konkurso okazos en ĵaŭdo 3-a de aŭgusto, je 10:45-11:30, en la salono Fighiera-Sikorska. La junaj oratoroj povas elekti unu el la jenaj temoj:

- Enmigrado en mian nunan loĝlandon lernigis al mi tiujn homajn valorojn:
- Mi ŝatas renkonti enmigrantojn kaj interŝanĝi kun ili ĉar…
- Kiel en/el-migrado povas plibonigi la mondon kaj disvastigi homajn valorojn?

Oni devos paroli en la Internacia Lingvo Esperanto pri la elektita temo libere kaj sen antaŭpreparita teksto, sed oni rajtos uzi memorigajn notojn. La parolado daŭros 5 ĝis 10 minutoj. La paroladojn oni taksos el vidpunktoj enhava, lingva kaj stila, kaj laŭ la ĝenerala sinteno de la kandidato kiel oratoro. La juĝkomisiono konsistas el: Marc Giraud (prezidanto), Siru Laine (membro) kaj Michael Boris Mandirola (membro). Ĝi aljuĝos tri premiojn: unua premio estos senpaga aliĝo al la Universala Kongreso en Aruŝa 2024 aŭ por la IJK 2024 en Litovio aŭ € 100; dua premio, € 75 kaj tria, € 50. La sumoj liverotaj kiel kuponoj por la Libroservo de UEA. Regularo de la konkurso troviĝas ĉe: uea.org/teko/regularoj/regularo_oratora_konkurso. Prepariĝi oni povos i.a. legante la librojn pri retoriko en Esperanto haveblaj en la Libroservo de UEA: mallonge.net/retoriko. Al la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino eblas aliĝi ĉe uk.esperanto.net/2023.

## Esperanto en Azio kaj Oceanio

La Azia Komisiono de UEA eldonas revuon por la propra regiono plus Oceanio (praktike Aŭstralio kaj Nov-Zelando). La kunordiganto de la Azia Komisiono estas s-ro Atuŝi Niŝinaga el Japanio.

Bulteno

============== 1520 vortoj =============

**Eraroj:**
**Kiu nenion faras, ne eraras. Ni, kiuj agas, neeviteble eraras.**

La teksto al EKO 43, p1 prezentanta pri la persona opinio de Laura Brazzabeni, havas plian aŭtoron. Nun mi scias, ke multo el tiu teksto estis verkita de Mirejo Grosjean. SMG pardonpetas al la koncernatoj.

La kolekto de EKO: https://www.ilei.info/agado/EKO.php por 2023 (ĝis 42).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj. Pri petoj pri forfaligo el la ricevantoj. Tio facilas por la grupoj kun unuopaj adresoj: Landaj kaj Fakaj Asocioj, la Gazetaro, ricevantoj el AMO-seminarioj 20-72. Aliaj ricevantoj ricevas la komunikojn pere de ret-grupoj, pri kies enhavo EKO havas neniun influon.